EKO 2022
Esperiga Komuniko

Subtene al la regiona, landa kaj loka agado


UEA

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 58>** ● Hispana kurso ● Etiopio ● Muziko ● Retkursoj **< okt. 19**

# Nova kurso por hispanlingvanoj

Mi aktualigas vin pri la progreso de la 3-a kurso por hispanparolantoj, amerika agado de UEA partnere kun TEJO kaj Kolombia Esperanto-Ligo.



La varba fazo finiĝis. Ni akiris de tio 431 aliĝintojn.
La kunordigantoj havas ĉi-jare la subtenon de 9 instruistoj:

- Araceli
- Carlos Lopez (Nova)
- Carlos Velasquillo
- Daniel Cotarelo
- Luis Obando (sur la foto)
- Moisés Herrera
- Luis Eliver (Nova)
- Yair (Nova)
- Doniben

Ni ne uzis pagatajn reklamilojn por allogi homojn, nur Facebook-afiŝaĵojn, KEL-retejon kaj "voĉ-al-voĉon". 342 aliĝis al baza kurso kaj 89 al meznivela kurso.
La landoj estas: Argentino, Bolivio, Brazilo, Bulgario, Kanado, Ĉilio, Kolombio, Kostariko, Ekvadoro, Salvadoro, Hispanio, Usono, Francio, Gvatemalo, Honduro, Meksiko, Peruo, Kongo, Dominika Respubliko, Urugvajo, Venezuelo.

Ĉi-jare alia novaĵo estas, ke ni uzas la socian reton *Discord* por arigi la grupon. Ni esperas per tio ankaŭ kreskigi la uzon de *Discord* en UEA. Sed ĉar *Discord* ne funkcias bone por pli grandaj grupoj, ni uzos ankaŭ Google Meet por la lecionoj.

Maniero subteni la kurson estas donaco al Amerika Fondaĵo de UEA: https://uea.org/alighoj/donacoj/ameriko - bona celo estus akiri 4000 EUR, ĉar tio helpas pri ĉiuj kostoj, inkluzive de aliĝo de kursanoj. Sed mi ne estas tre espera pri tiu atingo.

Fernando Maia

# Etiopio

En tiuj ĉi monatoj, la etiopianoj en la ĉefurbo Addis Ababa estas lernantaj Esperanton per la libreto lerno-materialo de Flandra Esperanto-Ligo.

Habtom Abesinian Esperantida

# Tajvanaj atingoj

Tiu ĉi kurso okazas por jam 22 jaroj  sinsekve kaj ĝi estas kadre de ekster-kursa lecionaro en Pingrong- mezalta lernejo, kiu estas la plej granda tia lernejo en la sudo de Tajvano. Kutime la nombro de niaj lernantoj varias de 10 ĝis 20 kelkaj kaj kvankam estas la minimuma nombro de 40 por malfermi similajn kursojn, tamen en la kazo de tiu ĉi kurso oni faras escepton, unue pro ĝia nekonateco kaj unikeco kaj due pro ĝia internacieco: Ĉiujare ni havas korespondadon kun Esperanto-kluboj en aliaj landoj kaj ankaŭ fojfoje ni havas eksterlandan gaston en la kurso.

En la fino de ĉiu eduka jaro ni disdonas atestilojn al la lernantoj kiuj havas la logtipon de UEA kaj tiun de la lernejo. Ni uzas la lernolibron "Esperanto per rekta metodo" de Stano Marcek kaj aliajn materialojn kiel Mazi en Gondolando, kantojn, ludojn ktp.

Jen foto de la kurso, kiu okazis antaŭ kelkaj jaroj kaj kiu en ĝi troviĝas Ingrid Chuang, la ĉefa instruisto, Reza, la asistanto de la kurso kaj la gasto Liru Chen




# Muziko el Brazilo

Nia retejo **Brazila Kolekto** (www.brazilakolekto.com), kiu arigas brazilajn kantojn en Esperanto, kvin-jariĝis en septembro kaj eniras novan bonegan fazon!
De nun vi, kiu enestas en nia retadresaro, ekricevos ĉiusemajne resumon de la nove publikigitaj kantoj, kaj ĉiam estos inter la unuaj ricevi informojn pri novaĵoj, kiel eventoj okazigotaj de nia skipo, novaj rimedoj de la retejo ktp.



# Retaj kursoj, katalogeto

angla/nederlanda - https://web.archive.org/web/20041211121113/http://anaproy.homeip.net/esperantocourse/

30 lingvoj - http://kurso.com.br/

kataluna - http://www.xtec.cat/~pmarti10/kurso.htm

hispana - https://web.archive.org/web/20041206062853/http://www.institutoesperanto.com.ar/inicio.htm

sveda - https://web.archive.org/web/20041204185048/http://www.esperanto.se/retkurso/

angla - https://web.archive.org/web/20090826054948/http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Kursoj/Verda_Koro/

germana - https://web.archive.org/web/20020108230622/http://www.lot49.de/fern/kurs3.htm




26 lingvoj - http://www.lernu.net

hungara -- http://www.eszperanto-online.hu kaj http://www.eszperanto-tanfolyam.hu

franca -

Kaj nia iKurso en Francio:

iKurso

Vidu la francan ilustraĵon por tiu kurso.

Sendis kaj kredeble kompilis la liston (krom tiu pri Francio) Laszlo Szilvasy

# Israelo kongresos kaj Z-festos

Jen abunde frua informado pri tiuj du aranĝoj. Atentu, por aperigo de via informo pri aranĝo en EKO, ĝi devas okazi post almenaŭ unu monato. Pro la inundo de materialoj, la redakto- kaj kontrolo-tempo, ni devas malakcepti centojn da tekstoj, ĉar ili okazos post tri tagoj aŭ semajnoj. Por tiuj novaĵoj taŭgas sociaj komunikiloj kaj eĉ ret-listoj. EKO fariĝas ĉiam pli maltuja komunikilo.

*Post la prediko, reen al Israelo, kies ekzemplo de frua informado estas sekvinda*

La venonta **Israela Kongreso** okazos en Tiberiado (ĉe la Lago de Galileo) de la 13-a ĝis la 15-a de aprilo 2023. La tradicia postkongresa ekskurso okazos tuj poste. Ĝenerale la programo kaj prezoj estos similaj al tiuj de la ĉi-jara IK (https://www.esperanto.org.il/ik.html). Jam eblas kaj indas aliĝi skribante al eli@esperanto.org.il.

2. La **Zamenhofa Vespero**/Landa Kunveno okazos hibride la 12-an de decembro en la sidejo de ELI en Alon-turo en Tel-Avivo.

3. La estraro akceptis mian peton retiriĝi de la dissendo de Israela E-isto en- kaj eksterlanden, pri kio mi okupiĝis dum ĉ. jardeko (redaktinte ĝin en la jaroj 2008-2020). La numero 173 (somero 2022, ĉefe pri Ukrainio) estis la lasta kiun mi dissendas. La venontajn numerojn dissendos la nuna redaktoro, Mikaelo Lineckij.

Amri Wanel.

# Rezultoj el Poznano

Universitato Adam Mickiewicz (UAM), Poznano, Pollando, Interlingvistikaj studoj 2011 Simpozio, plia diskut-ero pri: UEA-agado, informado.



En la video aperas Stefano Keller kaj Barbara Pietrzak (iamaj UEA-estraranoj ), Barbara estas fotita en salono Hamburg dum estrarkunsido de UEA). Zbigniew Galor, Tomasz Chmielik, Aleksander Melnikov (UAM), Ian_Fantom (intervenanto).

https://www.facebook.com/internacia.lingvo/posts/pfbid033zZM8Rb929cgaUnDFeM1awK9jRVfmyU5VNcGgvCW2jsWZ8GNcsR3c3UZMp8nbRJVl

Stefano Keller, https://www.facebook.com/internacia.lingvo/

# Ekzameno C2 je dispono en Herzberg

Ekde 2022 aldoniĝis nova nivelo (C2) al la KER-ekzamensistemo de UEA. En decembro 2021 kaj en januaro 2022 okazis la testado de la nova sistemo, en junio 2022 okazis la unuaj retaj ekzamenoj en niveloj B1, B2 kaj C1, en aŭgusto dum la Universala Kongreso en Montrealo debutis la nova C2-nivelo.
La sekva granda ekzamenevento estos **la lasta semajnfino de novembro 2022**, nome la **10a Tutmonda Ekzamentago**, kun ĉeestaj, paperaj ekzamenoj en ĉiu nivelo, kaj reta ekzameno je C2-nivelo. Informoj pri la sesioj kaj aliĝiloj ĉe: https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj. En Germanio eblos ekzameniĝi en Herzberg am Harz, bv. rigardi en la tabelo kaj aliĝi tuj!

Zsófia Kóródy, Esperanto-instruado, kursoj, ekzamenoj
Interkultura Centro Herzberg
DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6
http://esperanto-urbo.de

--

========= vortoj: 910 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.